# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

6a jarkolekto, n-ro 6
oktobro 1986


6 bis

A T E N T I N D A Ĵ O J

BOVOLE NOTU KE LA ĜENERALA KUNSIDO DEVAS ESTI PROKRASTITA ĜIS SABATO 18 10 1986 EKDE 13.30 H. EN LA ESPERANTODOMO EN ANTVERPENO. DO NE KIEL INDIKITE ANTAŬE.

RILATE LA GAZETARA-SERVO...

... NI SERĈAS PERSONO(J)N PRETA(J)N KOLEKTI NOVAĴOJN POR LA GAZETARO.
INTERESITOJ BONVOLE SIN ANONCU AL HERMAN DECEUNINCK AŬ IVO DURWAEL. ANTAŬAN DANKON.

25 10 1986 DE LA 10-A ĜIS LA 17-A HORO EN ESPERANTODOMO ANTWERPEN
--- STUDOTAGO GVIDATA DE IVO DURWAEL PRI LA INTERHOMAJ RILATOJ EN FEL.
BONVOLE ANONCU VIN ĈE IVO.

**Informilo,** kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. • Jarabono: 150 fr. • Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 • Respondeca eldonanto (*verantwoordelijke uitgever*): Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel.

## E S T R A R O kaj L A B O R G R U P O J

1. KUNORDIGADO : Ivo DURWAEL (prezidanto) 03/440 30 92
Paul Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM

Jan BOVENDEERD (sekretario)
Meidoorn 42/2, 2510 MORTSEL

2. FINANCOJ K. ADMINISTRADO (+ turismo + "taksi stop" + eldonoj)
Erik D'HONDT (estrarano) 053/77 44 97
Wilgstraat 25A, 9440 EREMBODEGEM

Paul PEERAERTS (direktoro) 03/234 34 00
Baron Dhanislaan 13, 2000 ANTWERPEN

Roland ROTSAERT ( estrarano) 050/33 00 04
Visspaanstraar 97, 8000 BRUGGE
050/33 00 04

Christian DECLERCK (kom. pri literaturo/eldonoj)
Amerikalei 135/2, 2000 ANTWERPEN

3. INFORMADO GAZETARA SERVO
Edward SYMOENS (estrarano) 03/666 62 66
Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT

Herman DECEUNINCK (kom. gazetara servo) 02/360 17 22
Villalaan 1 b.4, 1500 HALLE

4. INSTRUADO - PROPAGANDO - EKSPOZICIOJ - KONGRESOJ

Marc VAN DEN BEMPT 016/20 14 53
Duisburgsestraat 12, 3030 LEUVEN-HEVERLEE

Albert CLAESEN 011/32 36 03
Zonnebloemstraat 7, 3610 DIEPENBEEK

Ray GERARD
Antwerpsesteenweg 24, 2250 BROECHEM

5. GRUPA AGADO
Hilde VANINGELGEM-VANDRIESSCHE (estrarano) 053/70 50 11
Arbeidstraat 21, 9300 AALST

Trees DOOMS (prelegvojaĝoj) vidu P. Peeraerts

Jules VERSTRAETEN ( OMBUDSMAN) 03/827 66 43
St. Bernardsesteenweg 1078, 2710 HOBOKEN

Rilatoj kun FLEJA : Hilde VANINGELGEM.



Raporto pri la ĝenerala kunveno de Flandra Esperanto-Ligo, okazinta en Blankenberge, la 31an de aŭgusto 1986

---

Ĉeestis la jenaj estraranoj: Ivo Durwael, Erik D'Hondt kaj Roland Rotsaert

ID klarigas la planojn de FEL pri la jubilea jaro. FEL nun kunlaboras kun profesia reklamagentejo por la eldonado de flugfolioj, kursoj, kto.
Estis difinita stilo en kiuj ĉiuj publikaĵoj de FEL ekde nun estos.
La grupoj estas forte rekomendataj ankaŭ mem adopti tiun saman stilon por ke la publiko ricevu impreson de unu forta kohera organizaĵo. Por helpi al la grupoj, FEL ekde nun liveros al la grupoj broŝurojn, flugfoliojn, afiŝojn kto. sub kostoprezo. Ili estos proponitaj dum kunveno en oktobro.
La nova stilo estos montrita al la granda publiko dum gazetara konferenco.
La kurso Esperanto Programita baldaŭ estos havebla ne nur de FEL, sed ankaŭ en ĉiuj librobutikoj. Distribuos ĝin eldonejo Het Spectrum.
En la librobörso en Antverpeno (novembre) Esperanto-Programita estos prezentata al la granda publiko.
FEL eldonos krome teatraĵon en kiu la lingva problemo ludas rolon. Ĝi estos sendita al multaj teatraj trupoj senpage.
FEL petis subvencion ĉe la ministerio por du specialaj projektoj en 1987: lerneja projekto, kaj projekto por 60-plusuloj.
Estas daŭre ellaborata centra katalogo de la Esperanto-verkoj kiuj troviĝas en la diversaj flandraj bibliotekoj.
La Manlibro por Aktivuloj daŭre aperadas, nun sub gvido de Marc vanden Bempt. FEL forte rekomendas al ĉiuj grupoj aboni ĝin, ĉar ĝi enhavas ĉiajn interesajn novaĵojn por aktivuloj. La nuna prezo estas 1 franko por ĉiu paĝo. Abonebla ĉe Marc vanden Bempt aŭ en la Esperanto-Centro.
En 1987 estas programita ankaŭ nova kadrokurso por kursgvidantoj.

Post tiu ĉi enkonduko de ID venas libera diskuto:
- S-ino Alberto proponas, ke FEL ariĝu diversajn nacianojn por ke la televizio povu filmi ilin.
- S-ro Roose opinias, ke tio faciias, kunvokante eksterlandajn esperantistojn kiuj loĝas en Belgio.
- F-ino Caestecker proponas ke oni organizu unutagan manifestacion.
- S-ro de Smet proponas lui la Heyzel-salonon, ĉar la televizio estas tre nejma tie.
- S-ino van Veenendaal kritikas la eldonejon Spectrum, la reklamagentejon de FEL kaj la kurson Esperanto Programita.
- S-ro vanden Bempt opinias, ke oni devas akcepti la novan stilon de FEL kiel tuton, ne kritikante unuopajn detalojn.
- S-ro Marmenout kritikas LKK, ĉar ili ne invitis neesperantistojn. En 1987 oni pripensu tion.
- S-ro Alberto deziras ke FEL invitu junulojn, kiam la televizio venos.
- F-ino Tytgat memorigas niajn bonajn rilatojn kun la pola ambasado.
- S-ro de Smet proponas ke FEL patronu Ruandan Esperanto-Ligon kaj ke ĉiuj grupoj de FEL patronu po unu grupon de REL. Li petas, ke FEL metu la problemon sur la tagordo de venonta estrara kunsido,
- Demandate estas, kion Klubo 100 faris/as/os per la mono kiun tiom da bonvolemuloj donis al ĝi. Neniu povas respondi.

ID demandas, ĉu la grupoj jam havas konkretajn planojn por la jubilea jaro:
Gento: Kelkaj pretas prelegi en lernejoj. Eble la turisma servo distribuos faldfolion en Esperanto.
Loveno: Esperanto 2000 malfermos SIAn kaj aranĝos debaton inter politikistoj.
Folklora grupo je Pasko invitos grupojn el diversaj landoj sub la temo "internacia komprenigo".
Ili eldonos Historion de Esperanto en Loveno.

Brugo: Prelegoj en lernejoj. Akademia kunsido pro la 50jara ekzisto de la grupo "Paco kaj Justeco" (vŝ. antaŭlasta sabato de marto).
Aliaj grupoj aŭ ne ĉeestas, aŭ ne havas planojn jam.

Fine konkludiĝas jene pri la agado en 1987:

FEL provos organizi Esperanto-tagon en Bruselo, seeble kunlabore kun la pola ambasado, PPE, LEA kaj FLEJA.
FEL petu al la grupo de Mechelen ĉu eblas organizi kariljonkoncerton en la kadro de la Jubilea Jaro.
Ĉiuj grupoj kune finu la jubilean jaron per okazaĵo en la semajnfino antaŭ la 15a de decembro 1987.

Raportis PP.

## PRINCIPES IN VERBAND MET DE HUISSTIJL VAN FEL

1. Logo:
Vorm van de logo:

De buitenste lijn van de twee E's is steeds zwart. De E's worden opgevuld, ofwel met een mechanisch zwart raster, ofwel met een vol vlak in FEL-groen. Alleen bij kleine logo's kan de opvulling vervallen om technische redenen.

2. FEL-groen: Groen 389 (catalogus Pantone). FEL-groen wordt uitsluitend op wit papier gedrukt. Het wordt enkel gebruikt voor de logo zelf en eventueel voor kleine andere elementen. Nooit voor grotere vlakken.

3. Lettertypes:
Er worden drie lettertypes gebruikt: Helvetica, Ronda en Esperanto. Voor lopende teksten gebruikt men Helvetica. Voor siertitels Ronda. In de siertitels "Flandra Esperanto-Ligo" en van de tijdschriften van FEL, worden de hoofdletters gedrukt in het lettertype Esperanto, een type ontworpen door Hugo Fontyn.
Nota: Bij de Esperanto-documenten geldt deze regel alleen voor het kaft. Bij de binnenbladzijden wordt Times gebruikt, omdat dit zetsel reeds bestond voor de FEL-huisstijl werd bepaald.



## P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato 20-a de septembro 1986 en Antwerpen

Ĉeestis : Erik D'Hondt (ED), Ivo Durwael (ID), Paul Peeraerts (PP), Roland Rotsaert (RR), Hilde Vaningelgem-Vandriessche (HV) kaj Jan Bovendeerd (JB)
Petis senkulpigon : Edward Symoens (ES)
Prezidis : ID
Protokolis : JB

## T A G O R D O

1. La protokolo pri la antaŭa estrarkunsido estas unuanime aprobita.

2. FINANCOJ

2.1. La libroservo havas bonegan rezulton, verŝajne pro la lasta vendokampanjo.

2.2. 1986 estas jaro kun aparte altaj elspezoj, i.a. pro la planita propagandkampanjo (Esperanto Programita - nova leterpapero - informfolioj ktp)

2.3. La membronombro kreskis je 11 %.

2.4. Eldonado :

2.4.1. Stafeto librorondo havas nun 52 membrojn kiuj mendas 97 librojn

2.4.2. La eldono de antalogio pri socia poezio (kiu jam aperis en MONATO) kun antaŭparolo de W. Auld estas aprobita.

3. TURISMO

ED ekzamenos la eblecojn pri organizado de grupvojaĝo al Varsovio okaze de la UK 1987.

K. Tytgat anoncis jam sian pretecon kunlabori en la organizado pro siaj jamaj spertoj.

ED kunlaboros kun KT, kiu eble povos okupiĝi pri la ellaborado de vojaĝplano kaj eĉ gvidi la vojaĝon.

4. Ni intencas peti subvencion de la Eduka Fondaĵo "Carson" por la planita "PERKOMPUTILA LERNADO" projektata de Ray Gerard.

Temas pri fondaĵo,kies celoj estas financi nove iniciataj edukaj projektoj kiel :
- komputeraj programoj
- vojaĝ-studprogramoj
- financa subteno por vizitantaj profesoroj
- evoluigo de novaj lernolibroj, instruaj helpiloj kaj korespondaj kursoj
- starigo de Esperantaj kursoj en lernejoj, kolegioj aŭ universitatoj

- Esperantaj kursoj por elsendado pere de radio kaj televizio

Nia financa komisiono preparos buĝeton en kunlaboro kun R. Gerard. Tiu ĉi estos invitita al nia venonta estrarkunsido.

PP ankaŭ volas peti subvencion por la nove ellaborita ESPERANTO PROGRAMITA.

5. Redaktado de ESPERANTO PANORAMA
ID petas al ĉiuj, kaj principe al la kurs- kaj grup-gvidantoj atenti pri demandoj faritaj de membroj, lernantoj ktp al kiuj povus esti interese respondi en ESPERANTO PANORAMA

6. Jubileaj manifestacioj

6.1. JB dissendos al diversaj landaj asocioj, al Heroldo de Esperanto kaj al ESPERANTO de UEA leteron petanta kunlaboron en la jubilea programo kiun ni planas speciale en la fino de la jaro, ĉirkaŭ la Zamenhof-tago.

6.2. Ni ankaŭ petos al diversaj urboj kun kariljono (ekz. Aalst, Antwerpen, Brugge, Dendermonde k.a.) enmeti en sian koncert-programaron de la venonta jaro, koncerton dediĉitan al Esperanto kaj aperigi tion en la programlibreto.

6.3. En la fondkunveno de Unesko-Komisiono en Antwerpen, Urbestro COOLS pledis por Esperanto.
Andre Staes renkontis S-ron Paul Morren, redaktoro de Unesko-kuriero, kaj priparolis kun li la lernejan projekton iniciatitan en Anglio.
S-ro Paul Morren venos al la Esperantodomo por tie renkonti A. Staes kaj E. Symoens .

7. La planita letero al la provincaj servoj pri lok-nomoj estos dissendita ekde kiam la nova leterpapero estos preta.

8. Centra librokatalogo pri Esperanto-verkoj en Flandraj publikaj bibliotekoj.
La preparlaboroj estos daŭrigotaj, sed tio ne eblos antaŭ januaro pro tro da aliaj taskoj nuntempaj.

9. Patrona komitato por la jubilea jaro.
ES sciigis al JB telefone, ke li preparis leteron por la reĝo. Tamen, ĉar li estis informita pri la ekzisto de model-letero ĉe UEA, li petis informojn, sed neniam ricevis respondon.
Li nun sendos la leteron al la reĝo.

La klopodoj por aperigi poŝtmarkon en 1987 malsukcesis.

10. Preparo de la ĝenerala kunsido de oktobro
Tiu ĉi devas, pro cirkonstancoj nedependaj de nia bona volo, esti prokrastita ĝis 18 . 10 . 1986



10.1. Nova leterpapero :
Tiu ĉi estos prezentita al la ĝenerala kunsido en oktobro.
La grupoj estos invititaj uzi la novan paperon. Por eviti la certaj grupoj, kiuj ankoraŭ havas stokon de sia antaŭa papero, daŭre uzu tiun ĝis elĉerpiĝo, ID proponas donaci 50-o da novaj folioj. Aliaj preferus liveri la unuajn 100 ekzemplerojn duonpreze.

x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x

la grup-respondeculoj estas petataj prepari por la ĝenerala kunsido de oktobro ĉiuj donitaĵojn kiujn ili volas sur la grupa leterpapero, por ke PP povu zorgi por la presado.
Same por la frontpaĝo - event. kapo - de la grupaj bultenoj kaj/aŭ revuoj.

x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x

10.2. Faldfolio (nova)
Nia nova faldfolio, uzata en ekspozio en Limburgo, ne havis la deziratan rezulton. Mankas ĝuste tiuj informoj, kiujn la homoj volas.
Aliflanke mankas le necesa loko por meti la grupan stampon.
Ankaŭ rilate al la petata pago por informoj venis kritikoj.
La akompana karto plenigedan kaj resendotan estos kompletigita tiel ke senkosta informo ankaŭ estos ebla. Nur ampleksa inform-paketo estos pagenda.

10.3. Broŝuroj.
Jam pretaj estas : ESPERANTO VANDAAG kaj PROPEDEUTISCHE WAARDE VAN DE INTERNATIONALE TAAL ESPERANTO.
Aliaj estas adaptataj kaj pretigataj.
ESPERANTO, KION MI POVAS FARI PER TIO estos adaptita kaj kie necese reverkita. JB okupiĝos pri tio.

Estas la intenco aldoni al la studpaketo ESPERANTO PROGRAMITA ekzempleron de ESPERANTO KION MI POVAS FARI PER TIO, sed ĉar ĝi ne estas preta, tio povoas realiĝi nur poste.

10.4. Gazetara Servo
Laŭ nia opinio, la Gazetara Servo povus havi pli da rezultoj, sed Herman Deceuninck konstante plendas pri manko de informoj.
Tial ni serĉas persono(j)n preta(j)n regule ĉeesti Esperanto-aranĝojn aŭ telefone "ĉasi" novaĵojn.
Interesitoj bonvole sin anoncu, ĉu al Herman, ĉu al Ivo Durwael.

10.5. Komuna programo (-jubilea)

En la protokolo pri la kunsido de 31 08 1987 en Blankenberge, vi legos pri niaj planoj tiurilataj.

La demando nun estas, ĉu FEL okupiĝu pri iniciatoj, organizado kaj pliaj okupiĝoj ?

Ni proponas ilin al la ĝenerala kunsido de BEF je 08 11 1986 en Bruselo, petante kunlaboron de BEF kaj la aliaj Esperanto-organizoj en nia lando.

11. Kongreso 1988

Sin proponas LA VERDA STELO, Antwerpen.

1987 okazos en Nederlando. Tial FEL ne organizas Flandran Kongreson por ne konkurenci al niaj najbaroj.

11. Kotizoj, abonprezoj k.s. por 1987.

Nia financa komisiono priekzemenos tiun punkton por la ĝenerala kunsido de oktobro.

Proponite jam estas altigi la abonprezon de ESPERANTO PANORAMA ĝis BF 200,- tamen kun rabatkupono por la libroservo por ĉiu kiu pagos sian kotizon/abonon antaŭ ankoraŭ decidota dato.

12. Ĉefdelegito de UEA en Belgio.

Pro la forpaso de F-ino Andréé ORSOLINI, nia lando nun estas sen ĉefdelegito.

FEL intencas proponi ĉefdelegiton el niaj rangoj kaj, do, serĉas kandidaton.

13. SONORILO

FEL regule ricevas petojn de Sonorilo por reklami por ili en nia revuo ESPERANTO PANORAMA. Temas pri pagitaj anoncoj. Tamen, ĉar temas pri reklamo kontraŭ nia propra libroservo, konkurenca, do, la estraro opinias, ke ni faras al ni mem kaj certe al nia propra libroservo malbonan servon kaj tial decidas ne plu publiki tiujn reklam-anoncojn.

14. Diversaĵoj :

INSTITUCIO HODLER : Delonge ni atendas la kontraŭproponojn de Inst. Hodler rilate al la lu-kontrakto. Ĉar intertempe normale la malnovaj kondiĉoj ankoraŭ validas, estas decidite pagi la luon laŭ la antaŭa maniero.

Fino de la kunsido : 13.15 h.

Estontaj kunsidoj : 18 10 1987 - ekde 08.30 h. estrar-kunsido
ekde 13.30 h. ĝenerala kunsido



Raporto pri la 3-a Flandra Kongreso de 29 - 31 08 1987 en Blankenberge

Tiu kongreso devis esti alloga pro pluraj kialoj : bela marborda urbo kun tre bela strando, normale bela vetero, ĉiuj okazaĵoj en la sama konstruaĵo eĉ en la sama salono, programo kiu estis ne malinteresa, ebleco vidi la faman florsekvantaron. Sed la malbonega vetero - jam de multaj tagoj antaŭe - malarangis ĝin parte. Ĉu pro lasta kialo nur 93 aliĝintoj ? Inter tiuj estis multaj nederlandanoj. Ni miris ke preskaŭ neniu venis el norda Francujo. Kaj de nia propra Flandra Ligo la partopreno ankaŭ ne estis tre brila.

La malfermo okazis la vendredon vespere. Alparolado de la LKK-prezidanto F. Roose kaj diversaj salutoj.

Post la interrenkontiĝo estis vizito al la ampleksa librostando kiu havis multe da sukceso. Oni multe vendis. La proponita vesperpromenado sur la dunoj kaj admiro de sunmalleviĝo en la maro ... falis en la akvon, litere kaj figure.

Sabaton matene je la 10-a h. : "Akademia Kunsido" kun temo : La nuna stato de Esperanto, lingvo kaj movado kaj la perspektivoj". Tio vekis grandan interesiĝon. Preskaŭ 70 personoj ĉeestis. La unua parolanto, Grégoire Maertens ĉefe prilumis la strukturon kaj agadon de UEA-estraro.

Speciale interesa kaj profunda estis la ĝenerala analizo kiun skizis S-ro Symoens. Li evidentigis la nudajn pertinentajn faktojn kiuj devas malblindigi nin. Se resumi : post centjara ekzisto de Esperanto, kaj malgraŭ la multaj favoraj deklaroj kaj (ŝajn)sukcesoj, la socio ne akceptas Esperanton. Ni devas esplori laŭ scienca maniero la kaŭzojn de tiu fenomeno kaj de ĉiuj cirkonstancoj akampanantaj ĝin.

Espereble tiu kontribuo de S-ro Symoens estos en artikolo je ĉies dispono.

Konsekvence vigla ideo-interŝanĝo okazis post tiu parolado.

Posttagmeze plena granda aŭtobuso veturigis nin al la haveno Zeebrugge. Pri ĝia evoluo la LKK-prezidanto estis publikiginta artikolon en la januara numero 1986 de MONATO. Ankaŭ tie unu seniluziiĝo : ni ne povis eniri ĝis la salono kie oni montras filmon. Kaŭzo : subita transportado de municio ! Tamen la ĉirkaŭveturado kaj la teknikaj kaj ciferplenaj klarigoj estis tre interesaj.

Vespere Wim De Smet montris belajn diapozitivojn pri Ruando. Ankaŭ lia prelego pri ĝiaj lando kaj popoloj estis interesplena. Tiuokaze ni alvokas por subteno de la tiea leviĝanta Esperantomovado pere de speciala fonduso ĉe la Flandra Esperanto-Ligo.

Kaj poste estis denove elektebleco : ĉu kune promenadi, ĉu veturi al Bruĝo por admiri la lumigadon de la antikva kadro de tiu rubo. Sed denove tiu malbonega vetero. Pluvegis ! Post longa hezitado malgranda grupo tamen decidis iri al Bruĝo. Kiam ni tie alvenis, ni estis benataj per forta pluvego ... kiu iom post iom mildiĝis ... tiel ke ni povis fari la tutan premenon. Dume ne mankis la historiaj klarigoj de la LKK-prezidanto-historiisto.

Por fini ni eniris trinkejon kie ni ripozis, babilis, ŝercis. Estis post noktomezo kiam ni revenis en "Duinse Polders".

Dimanĉon matene okazis la dua grava kunveno, la ĝenerala de Flandra Lig[a]. Enkondukis ĝin Ivo Durwael.

Pri tiu kunveno, bonvole legu la protokolon je paĝo 3-a de ĉi-bulteno.

Raportis Fernand Roose

----------------------

Korektendoj/Ŝanĝendoj

En via organigramo en la rubrikoj LIMBURGO kaj HASSELT, bv korekti la telefonnumeron de Albert Claesen en 011/32 36 03

En la estrara rubriko kaj sub Mortsel bv. ŝanĝi la adreson de la sekretario, nome : Jan Bovendeerd, Meidoorn 42/2 2510 MORTSEL , telefono senŝanĝa.

----------------------

Membraro 1985 - 1986 je 860924

| Grupo | en 1985 | en 1986 |
|---|---|---|
| Aalst | 41 | 43 |
| Brussel | 22 | 35 |
| Blankenberge | 7 | 5 |
| Brugge (Segna) | 26 | 11 |
| Leuven | 55 | 60 |
| Kalmthout | 32 | 38 |
| Gent | 19 | 37 |
| Kortrijk | 32 | 39 |
| Limburg | 47 | 48 |
| Antwerpen | 139 | 140 |
| Mechelen | 7 | 17 |
| Mortsel | 22 | 20 |
| Brugge (PJ) | 35 | 40 |
| Sint-Niklaas | 9 | 3 |
| Wilrijk | 3 | 3 |
| FEL | 97 | 123 |
| Entute | 593 | 662 |



LA INTERHOMAJ RILATOJ EN FEL - VII

LA ĴUDO DE LA INTERHOMAJ RILATOJ

Roland Rotsaert rakontis al mi, ke li ne bone komprenis la celon de ĉi tiu rubriko. Li supozeble ne estas sola. Por klarigi tion, mi faros komparon kun judo.

Ĵudo ne estas batal-, sed japana defendmetodo. Japanoj precizeĝe analizis la movojn de homo, kiu atakas. Ili malkovris kiel oni povas eluzi la forton kaj energion de la atakanto por sia propra bono. Kutime, post fizika atako sekvas fuĝo aŭ kontraŭatako. En la lasta kazo, la plej forta venkos. Sed judo furoris en Eŭropo, kiam malgranda, svelta viro sukcesis venki la plej fortajn renomajn luktistojn, unu post la alia.

Esperanto, konstante konfrontiĝas kun fortegaj malamikaj atakoj : nacia protektemo, skepticismo, antaŭjuĝoj, manko de informoj, inercio ...
Se ni ŝatas venki ilin per kontraŭatako, ni certe ne havas plej etan ŝancon. Pro tio mi tiom interesiĝas pri transakcia analizo, ĉar ĝi ŝajnas al mi la ĵudo de la interhomaj rilatoj. Ĝi permesas al ni tutunue analizi niajn proprajn povojn kaj krome kompreni kaj ĝuste taksi la dirajojn kaj agojn de la homoj kun kiuj ni rilatas, plie eluzi kritikojn, malamikajn gestojn kaj transformi ilin en subteno kaj apogo.

Same kiel la bona apliko de ĵudo, TA postulas longan studadon kaj daŭran ekzercadon. Mia rubriko do certe ne sufiĉas por majstri tiun ĉi teknikon. Mia celo estas precipe inciti vin por enprofundiĝi en la funkciadon de la homaj rilatoj. Sed eĉ tiuj, kiuj ne volas dediĉi tempon al tiu temo, povas - mi esperas - iel profiti de tiuj gutoj, konstante frapantaj en ĉi tiu rubriko.

Mi volas iom ilustri la ĉi suprajn asertojn pri la eluzo de alies energio per kelkaj pripensoj pri kritikoj kaj pri kolero.

Internacia Lingvo estas kreita por pli bona interkompreniĝo, alivorte por starigi pli intimajn rilatojn.

Pro la instruo de niaj gepatroj, instruistoj ktp ni kutimas kritiki la agojn de aliaj homoj. Multegaj homoj opinias ke publika kritikado (ekz. en esperantistaj kunvenoj kaj gazetoj) estas grava fonto de progreso en nia socio (en nia societo). Nu, se vi analizas, kio okazas en via pensoj, kiam iu kritikas vin publike, vi konsciiĝos, ke kritiko vekas la fortan emon kontraŭataki. Se vi faras tion, subite fermiĝas ĉiuj eblecoj por pli bone interkompreniĝi. Se kolego kritikas min, en ĉeesto de aliaj homoj, li klare manifestas per tio, ke li ne interesiĝas pri miaj motivoj. Eĉ se mi havas

senton de malpraveco, mi streĉigos mian cerbon por trovi kontraŭargumentojn, kaj tiel nuligas la eblecon por trovi komunan starpunkton.

Antaŭ kritiki, mi konsilas do informiĝi pri alies argumentoj. Kritiko okazu principe nur inter du personoj. Publika kritiko povas ja helpi por varbi publikon, ne por konvinki la personon kiun oni kritikas. Sed persona invito por ŝanĝi ion kaj manifesto de aprezo kaj ĝojo pri plej eta ŝanĝiĝo ĉirilata montriĝos pli efikaj al insultoj kaj kritikoj.

Ankaŭ kolero malhelpas kontaktojn kun aliaj homoj. Mi ofte sentis koleron ekregi min, kiam okazis io, kio malplaĉis al mi. Kiam mi sentas koleron, mi tute ne plu kapablas aŭskulti la argumentojn de aliaj homoj : mi ŝlosas min por sinceraj ideointerŝanĝoj. Tiu kolero ofte invadis mian menson neatendite kaj nerezisteble. Tamen, pro kaj per TA mi sukcesis analizi la estiĝon de tiu noca sento kaj tiu malkovro solvis multon.

La sekvanta paŝo estas la malkovro de la fonto de kritikemo kaj kolero ĉe aliaj homoj en la ĉirkaŭaĵo. Mi pli detale priparolos la naskiĝon kaj la sencon de kolero kaj kritikemo en venontaj artikoloj. Tiu, kiu scipovas malkovri tion ankaŭ sukcesos neŭtralizi ilin. Ĉu tio ne allogas vin ?

Pri tiuj ĉi problemoj kaj pri aliaj facetoj de la interhomaj rilatoj, mi pretas gvidi studotagon je 25 / 10 / 1986 en la Esperanto-Centro, inter la 10-a kaj 17-a horo.

Surloke haveblos panmanĝo.

Bonvolu anonci vian partoprenon al Ivo Durwael.